# Eŭropa Bulteno

Decembro 2015, Numero 155

## LA JARO 2015



Fine de la jaro ni resumu, kio grava okazis por la E-movado en ĝi. Bedaŭrinde laŭ mia takso la ĉefaj poresperataj atingoj ĉi-jare ne venis el EEU aŭ pro EEU. Sed kelkaj esceptaj atingoj karakterizis ankaŭ ĉi-tiun jaron.

Antaŭ ĉio mi elstarigus la kreon de duolingo-esperanto-reta kurso. Similan eduksukceson ni ankoraŭ ne havis. Dum proksimume duonjaro al la kurso aliĝis 230.000 personoj!! Multaj el ili ankaŭ finstudis la tutan kurson kaj nun jam diversmaniere aktivas en Esperanto. La merito ne estas esperantista. Ja la kursmetodo estis evoluigita de la teamo de duolingo, sed dank' al insisto kaj laboro de Chuk Smith realiĝis konkreta novtipa instrudo de Esperanto kun enormaj konsekvencoj.

Lige al novaj teknologioj, ŝajnas al mi, ke tre grava atingo estas kreo de softvaro, kiu tre precize, preskaŭ sen eraroj, kapablas dismeti ĉiujn skribitajn tekstojn al morfemoj. Tiun

softvaron kreis belga esperantisto Raymond Gerard (Remuŝ). Ĝi jam ebligis plurajn esplorojn kaj komenciĝis granda analizo de tekstoj kun plurmilionoj da vortoj, kiu jam reliefigis bazan morfemliston de la plej oftaj morfemoj kiu iom korektis mian ekzistantan analizon el 1982, sed esence konfirmis ke 90% de la morfemoj en malnova analizo korespondas kun la novaj esploroj. Tiel ni jam aperigis en tiu ĉi bulteno (aŭgusto) tiun bazan liston, kiu devus esti fundamento por kiu ajn komenca lernolibro. Esperanto havas tiun avantaĝon, male ol naciaj lingvoj, povi havi morfemanalizon kaj realan scion pri tio kiuj lingvaj elemenoj enhavas ĉion gravan por komenca sed sufiĉe ampleksa lingvokono kun kapablo krei mem plivastigojn en sia lingva uzo.

La jaro alportis al ni la informon ke unu el la plej gravaj eŭropaj politikistoj: la komisionano de Eŭropa Komisiono por medicino, d-ro Vytenis Andriukaitis, estas esperantisto kaj li esprimis pretecon veni al la UK en Nitro, kio certe estos unu el la plej grandaj atingoj, ĉar tiom altpozicia politikisto neniam ĝis nun estis en iu UK kaj parolis en Esperanto.
Lige al tio oni povas konsideri la decidon de UEA akcepti inviton de Slovakio por la sekvajara UK kiel trafan decidon kiu ebligis alitipan kongreson en la komenco de prezidanteco de Slovakio en EU-konsilio kun pluraj aldonaj aranĝoj (pri tio en la suba artikolo de Jozef Reinvart).

Alia grava atingo estis akcepto de UNESCO meti inter kelkdeko da gravaj mondaj personoj kies jubileo estas prinotata en 2017 Ludovikon Lazaron Zamenhof, kio ebligas al la tuta E-movado kun pli da aŭtoritato dum tiu jaro publike turni sin al ekstero. Tio okazis dank' al eksteordinaraj klopodoj de grupeto da polaj esperantistoj.

Kaj ŝanas al mi tre grava atingo nerekte ligita al Esperanto, ke la paĝaro deutsch.info proponita de esperantista etrepreno Studio Gaus el Berlino kaj kreita baze de lernu.net estis proklamita de Germana Premio »Website des Jahres 2015« kiu promocias retajn projektojn kiel la plej bona eduka retpaĝo en Germanio en 2015 sur la kampo de edukado kaj kariero.

Zlatko Tišljar

# LA 101-a UNIVERSALA KONGRESO (UK) de ESPERANTO EN NITRO 2016 (ŝanco por malfermi nian movadon al la mondo)

Esperantistoj en Slovakio ekstermovade agas diversforme jam ekde la jaro 2004. Preskaŭ 10 jarojn ili plenumas rekomendon de la Strategia Laborplano de UEA aprobitan en Rejkjaviko en 2013, ekstermovade agi kaj malfermi nian movadon al la mondo kaj serĉi aliancanojn por kunlaboro kaj nia plua pli efika agado. Loka kongresa komistato (LKK) de la 101a UK volas por tiu ĉi celo utiligi la fakton, ke la 101-a UK okazos en la tempo, kiam  Slovakio prezidos la Konsilion de EU (julio – decembro 2016).

**Dum la 101-a UK (23a – 30a de julio 2016) okazos 4 malfermitaj fakaj aranĝoj:**

- Lingvo-politika konferenco de Viŝegradaj landoj V4+ „Perspektivoj de lingva komunikado en EU“
- Internacia entreprenista kaj komerca forumo „Investi en koro de Eŭropo - investi en Slovakio“
- „Inter-religia renkontiĝo“ de reprezentantoj de diversaj religioj

- La 20-a Internacia Medicina Esperanta Kongreso

**Lingvo-politika konferenco de landoj V4+ „Perspektivo de lingva komunikado en EU“ (de la 28a – 29-a de julio 2016)**

La konferenco estos organizita nome de V4+ landoj (Ĉeĥio, Hungario, Pollando, Slovakio plus samopiniantaj landoj) sub aŭspicio de Miroslav Lajčák, vic-ĉefministro kaj ministro pri eksterlandaj kaj eŭropaj aferoj de Slovakio, kiuj konsentis pri listigo de la konferenco inter aranĝoj de SK PRES en Konsilio de EU. La unuan fojon partoprenos ĝin kune politikistoj, lingvistoj kaj reprezentantoj de civitanoj. Ĝia ĉeforganizanto estas Fakultato de Mezeŭropaj Studoj de Universitato de Konstantino Filozofo (UKF) en Nitra, kiu kunlaboros kun esperantistaj organizoj (Slovakia Esperanto Federacio, Eŭropa Esperanto Unio, Esperanta Studa Fondaĵo, Edukado@Interreto) slovakiaj kaj eksterlandaj neregistaraj organizoj.

Rektoro de la UKF en Nitra invitis, kiel ĉefparolantojn: Ján Figeľ (SK), Vic-Prezidanton NK de SR kaj eksan EU Komisianon por Edukado, Kulturo kaj Multlingvismo (2004 - 2009), kiu jam neformale promesis partopreni, Vytenis Andriukaitis (LT), EU Komisianon por Sano kaj Nutraĵa Sekureco (2014 - ), en 70-aj jaroj studis Esperanton kaj esprimis intereson partopreni kaj Tibor Navracsics (HU), EU Komisianon por Edukado, Kulturo, Sporto kaj Junularo (2014 -).

La celo de la konferenco estas prepari politikan kaj fakan „Manifeston“ aŭ „Deklaracion“, kiu estos sendita al prezidantoj de tri plej gravaj EU institucioj, por lanĉi tuteŭropan disktuton pri serĉado de justaj kaj efikaj solvoj de lingvaj problemoj. „Solvoj devas esti novigaj, kosti malpli kaj alporti plibonajn rezultojn“, laŭ citaĵo de Ján Figeľ en EEU panelo dum la Ekonomia Forumo en Krynica en septembro 2014.

**Internacia entreprenista kaj komerca forumo „Investi en koro de Eŭropo: investi en Slovakio“ (la 26-an de julio 2016)**

La forumo okazos sub aŭspicio de Miroslav Lajčák, vic-ĉefministro kaj ministro de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio, kiu konsentis pri listigo de la forumo inter aranĝoj de SK PRES en Konsilio de EU. La forumo estas preparata kunlabore kun ŝtataj institucioj de Slovakio kaj Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF).

Laŭ programpropono de la forumo okazos panela diskuto pri la temo: „Investi en koro de Europo - investi en Slovakio“, dum kiu estos prezentitaj ekonomiaj kondiĉoj por entreprenado kaj investado en Slovakio fare de Slovakia Agentejo por Evoluo de Investado kaj Komerco kaj estos prezentitaj sukcesaj spertoj de eksterlandaj firmaoj, kiuj investis kaj entreprenas en Slovakio el EU, Koreujo, Usono kaj aliaj landoj. La dua parto estos dediĉita al temo „Slovakio – lando de multaj belaĵoj“, dum kiu Slovakia Agentejo por Turismo prezentos Slovakion kiel allogan turisman destinon. Fine estos organizita programparto „Slovakio – lando en centro de Eŭropo“, dum kiu okazos entreprenistaj kaj komercaj negocadoj.

**Interreligia renkontiĝo de reprezentantoj de diversaj religioj (la 25-an de julio 2016)**

Slovakia Esperanto Federacio kaj nerigistara organizo Parlamento de Mondaj Religioj –

Slovakio preparas kunlabore kun esperantistaj, tiel ankaŭ neesperantistaj slovakiaj kaj eksterlandaj religiaj asocioj/komunumoj la inter-religian renkontiĝon en kunteksto de akriĝantaj kaj konfrontiĝantaj interreligiaj rilatoj en la mondo por kontribui al inter-religia dialogo, kiu estas nura solvo. Dum la renkontiĝo estos diskutataj aktualaj sociaj, ekonomiaj kaj inter-religiaj problemoj.



La organizantoj petis pri aŭspicio Peter Pellegrini, prezidanton de Nacia Konsilio de Slovakio. Nia neesperantista partnera organizo, civitana unuiĝo Parlamento de Mondaj Religioj - Slovakio, prezentis kandidatidatiĝon de Bratislava organizi renkontiĝon de mondaj religioj en 2017, kiuj okazas ĉiun 5-an jaron, kiun partoprenas pli ol 10.000 reprezentantoj de 80 mondaj religioj.

Pere de la inter-religia renkontiĝo nia movado havas ŝancon malfermiĝi al la mondo. Nia movado povos kun aliancanoj kontribui al lingva, kultura kaj religia interkompreniĝo inter kredantoj de diversaj religioj.

**20-a Internacia Medicina Esperanta Kongreso (IMEK) „Kuracistoj kaj tutmondiĝo: kiaj kuracistoj estas bezonataj en la nova jarcento?“ (de la 20a – 22-a de julio 2016)**

La jubilea IMEK estas organizata kunlabore kun Slovakia Esperanta Federacio kaj Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) fondita en la jaro 1908, kiu organizas kongresojn ĉiun duan jaron ekde la jaro 1977. La Ministro de Sano de Slovakio Viliam Čislák transprenis aŭspicion super la 20a IMEK. La kongreson partoprenos esperantistaj kuracistoj de la mondo, slovakaj, ĉeĥaj kaj aliaj eksterlandaj kuracistoj. Ili kune diskutos pri aktualaj defioj de tutmondiĝo, civilizaciaj malsanoj, komuna serĉado de efikaj kuracmetodoj.

**En la jaro 2016 estos la 20-a datreveno de publikigo de „Manifesto de Prago“**, kiu prezentis nian movadon kaj ĝiajn celojn al la mondo. Ni utiligu tiun ĉi jubileon kaj la malferemitajn fakajn aranĝojn por pli granda malfermiĝo de nia movado. Ni havos eksterordinaran ŝancon , ke la 101-a UK en Nitro okazos dum la prezidanteco de Slovakio en Konsilio de EU. Ni profitu de tiuj ĉi favoraj cirkonstancoj, prezentu nian movadon, Esperanton al la mondo kaj klopodu pri kreo de rilatoj kun samopiniantaj neesperantistaj partneroj/aliancanoj por longdaŭra kunlaboro por daŭropova evoluo de la monda komunumo.

Jozef Reinvart
Sekretario de LKK de la 101-a UK por eksterlandaj, diplomatiaj kaj fakaj rilatoj

# INTERNACIA SIMPOZIO HELPE DE ESPERANTO POR NEESPERANTISTOJ



La 23-an de novembro 2015 en Wrocław, en la monumenta konstruaĵo de Ekonomika Universitato, okazis internacia simpozio, titolita „Pliaĝuloj en diversaj kulturoj”. La simpozion iniciatis kaj organizis esperantistoj el la centro de interkultura edukado – BR Vroclavo kaj la brarazila centro internacional de omunicação Bona Espero-Unio Planeda, Brasilia, kunlabore kun la neesperantista organizaĵo Vroclava entro de pliaĝuloj, por neesperantista publiko kaj interesiĝantaj esperantistoj. La elektitan temon - bildo de sociaj rajtoj kaj rolo de pliaĝuloj en antikvo kaj hodiaŭo en diversaj landoj – prezentis invititaj prelegantoj el polaj universitatoj kaj, danke al esperantistaj kontaktoj, el Brazilo, Germanio, Hungario, Italio kaj Usono. Ĉe la komeco kaj ĉe la fino estis prezentitaj filmoj pri la ĉijara festo de pliaĝuloj en Brazilio kaj en Wrocław. La simpozio estis gvidata dulingve – en la pola kaj en Esperanto. La prelegoj de eksterlandanoj estis senpere tradukitaj pollingven kaj ĉiuj tekstoj dulingve estos publikigitaj presforme post la aranĝo.

La prelegon „Rajtoj de pliaĝuloj en Brazilo" de Ursula Grattapaglia ni planis prezenti per skajpo sed, pro neatenditaj teknikaj problemoj, prezentis ĝin la fama vroclava esperantisto Andrzej Kraszewski. Dr-ino Walentyna Wnuk prezentis en sia prelego potencialon de la malfrua matureco en Pollando. Profesorino Ilona Koutny prezentis prelegon pri la kunlaboro inter diversaĝuloj kadre de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj Małgorzata J. Komarnicka priparolis rezultojn de esploroj, kiujn ŝi gvidas inter pliaĝuloj - partoprenantoj de Esperanto kursoj. La prelego de profesoro Ronald Glossop estis speco de




himno pri Esperanto kaj ĝia utileco por ĉiu aĝo. Dr-ino Monika Humeniuk-Walczak vekis grandan intereson, prezentante la pozicion de maljunuloj en la popola islamo. Kun granda admiro estis akceptita prelego de Wera Blanke, kiu, laŭ sia aktora sperto, prezentis kelkajn teknikajn konsilojn por publika parolado, kio tre plaĉis al la publiko. Prelego de la doktoriĝantino Ilona Zakowicz montris bildon de

maljuneco en Pollando, en socia kaj kultura dimensioj. La interesa prelego de profesoro Davide Astori “Maljunuleco en la antikvaj tempoj (greka, romia, hebrea kaj kristana)” pro tio, ke la aŭtoro ne povis veni, estos prezentita presforme.

La simpozion ĉeestis pli ol cent personoj, ne kalkulante la oficialajn gastojn, tradukistojn kaj prelegantojn. Fono de la simpozio estis ekspozicio priskribanta historion de Esperanto kaj organizita surbaze de la materialo portita aranĝonde esperantistoj el Wroclaw, Gliwice kaj Lublin. Mi povas aldoni, ke dum paŭzoj ni povis frandi Esperanto-kukon (blanka - verda kiel esperanta flago).

La internacia simpozio efektivigis mian revon - montri al neesperantistoj eblecon utiligi Esperanton je la scienca nivelo. Nia unua tiuspeca aranĝo jam plenumis gravan rolon - ĝi montris, ke esperantistoj scipovas organizi, kune kun neesperantistoj, altnivelan, edukan aranĝon. La lokaj ĵurnalistoj pozitive priskribis la aranĝon, oni jam petis organizi novan E-kurson kaj mi ricevis la inviton prelegi pri Esperanto en la prestiĝa en nia urbo altlernejo, populare nomata „Papa Universitato”.

Kun granda ĝojo mi aldonas, ke la simpozion patronis prorektoro pri didaktiko de la ekonomika universitato prof. dr-o hab. inĝ. Edmund Cibis, reprezentanto de rektoro de UTA de ekonomika universitato dr inĝ. Marek Urban kaj organizaĵoj: Universala Esperanto Asocio, postdiplomaj interlingvistikaj studoj ĉe Adam Mickiewicz universitato en Poznan kaj la Interkompreniĝo de plenrajtigitoj de la altlernejaj rektoroj por la universitatoj de la tria aĝo en Wrocław. Amaskomunikilan Patronecon plenumis Gazeta Senior, Pola RetRadio kaj brazila União Planetária – TVSUPREN.

Małgosia Komarnicka

# DEK-JARIĜO DE E@I

Jen eta superrigardo pri la agado de E@I ekde ties komenco ĝis nun (14-a de novembro 2015), omaĝe al la 10-jariĝo de la fondo de la organizo kiel memstara neregistara organizaĵo.

Historio skize

- 1999 – fondo de neoficiala laborgrupo “Esperanto@Interreto” (E@I)
- 2000 – unua trejn-seminario
- 2002 – lanĉo de lernu.net
- 2005 – (14.11.) – oficiale agnoskita internacia neregistara organizo (en Slovakio): E@I (Edukado@Interreto)
- 2007 – unua SES (Pribylina, Slovakio)
- 2009 – unua EU-projekto: retejo slovake.eu (peresperanta, ne poresperanta projekto)
- 2010 – unua staĝanto per programo Erasmus
- 2010 – unua KAEST, organizita de E@I
- 2011 – propra oficejo en Partizánske
- (2013 – ŝanĝo de la oficejo al pli granda)
- 2013 – unua volontulo per EVS
- 2015 – 10-a SES (Martin, Slovakio)La agado de E@I konsistas el kelkaj partoj, foje forte ligitaj, foje tute sendependaj. La projektojn kaj la agadon eblas dividi al: organizado de

aranĝoj, kreado de edukaj retejoj, eldona agado, ceteraĵoj. Jen eta superrigardo de ili, dividitaj al unuopaj kategorioj.




## Aranĝoj

- E@I-seminarioj: Inter la jaroj 2000 – 2006 okazis entute ok trejnseminarioj, kiuj signife influis la organizon. Precipe en la unuaj jaroj de la funkciado de E@I, trejnseminarioj pri temoj rilataj al edukado kaj interreto havis gravan rolon en la disvolviĝo de la asocio kaj trovado de novaj aktivuloj. En la tempo kiam E@I estis faka sekcio de TEJO, ĝiaj seminarioj estis samtempe ankaŭ TEJO-seminarioj.
- SES: Ekde 2007 ĝis 2015 okazis jam 10-foje la Somera Esperanto-Studado (en la jaro 2014 ĝi okazis eĉ 2-foje, unu en Slovakio, alia en Rusio). Ĝi iĝis relative rapide la plej granda somera E-lernejo tutmonde (kun proksimume 200-250 partoprenantoj el ĉ. 20 landoj).
- KAEST – Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko: (2010, 2012, 2014): En novembro de 2010 unuafoje sub gvido de E@I en Modra okazis la konferenco pri faka uzo de Esperanto KAEST, aranĝo kun tradicio en Ĉeĥoslovakio ekde 1978, kies organizadon E@I transprenis de KAVA-PECH. La aranĝo okazas ĉiun paran jaron novembre en la urbeto Modra.
- SAT-kongreso: La teamo de E@I helpis okazigi la SAT-kongreson en la urbo Nitra en la jaro 2015. Kun SAT ĝi kunlaboris ankaŭ pri la kreo de la reta versio de PIV, retejo vortaro.net.
- UK 2016: E@I ankaŭ aktive partoprenas en la organizado de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos julie 2016 en Nitro, Slovakio.
- Lingva kafejo (Jazyková kaviareň Partizánske): Ĉiumonate okazigas E@I kaj ties volontuloj en "Kinobar IVA", Partizánske t.n. Lingvan kafejon – unu vesperon kun eblo paroli en diversaj lingvoj ĉe apartaj tabloj. Kompreneble Esperanto-tablo ankaŭ ĉeestas.

## Eldonaĵoj

E@I eldonis plurajn verkojn, ofte kunlabore kun la slovaka eldonejo Espero. La eldonaĵoj aperis komence kiel flanka okupo, kiun ofte instigis la uzantoj de retaj projektoj de E@I (ekz.

lernu!-KD kaj Komputeko-libro). Same plej multaj eldonaĵoj estas rezulto de reta kunlaboro de internacia teamo. Tamen la eldona fako de E@I iĝas pli kaj pli populara kaj en estonteco daŭre kreskos.

La unua libro aperis en la jaro 2005. Temas pri *Manlibro pri instruado de Esperanto* – libro eldonita kune kun ILEI, sub la redaktora gvido de Katalin Kovats. Kontribuis al ĝi 13 aŭtoroj. (Aperis jam 3 eldonoj). La verko estas rezulto de la projekto “Flugiloj de Malfacila Vento” kaj uzita dum ĝiaj seminarioj kiel instru-libro.

Pri Vikipedio E@I realigis du verkojn: *Vikipedio – praktika manlibro* (en 2005) kaj *Vikipedio por vi* (en 2008), detala verko, kiu klarigas la fenomenon Vikipedio kun multaj konsiloj, klarigoj kaj paŝo post paŝo gvidas leganton iĝi facile ne nur uzanto de tiu reta enciklopedio sed ĝia aktiva kontribuanto.




En 2008 aperis unua terminaro prikomputila *Komputeko*. Ĉar ĝi rapide elvendiĝis, en 2012 aperis dua eldono, ampleksigita. Ekde la jaro 2010 E@I transprenis la organizadon de KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko). Tial ankaŭ E@I ek-eldonis la KAEST-prelegokolektojn en 2011, 2013 kaj 2015.
Cetere sub la marko de E@I aperis (en 2010) “lernu!-gramatiko” – la libro *Detala gramatiko de Esperanto* – nova verko de la aŭtoro de PMEG – Bertilo Wennergren, kiu kreis tiun ĉi libron, kiu baze estas mallongigo de PMEG kun parte aliaj gramatikterminoj. En 2013 aperis, lernolibro de la minimumisma lingvo tokipono**,** lernebla de Esperanto (kiu cetere estis entute la unua papera lernolibro de tiu ĉi lingveto).

De la diskoj estus certe menciindaj eĉ ĉiuj, ĉar ĉiu el ili estas iaspeca unikaĵo en la E-movado kaj eĉ ekster ĝi. La KD *Esperanto* estis produktita en la jaro 2008, danke al la kunlaboro de E@I kaj urbo Bjalistoko aperis la disko en la pola tagĵurnalo *Gazeta Wyborcza* – ĝis nun temas pri la plej multnombra E-eldonaĵo elektronika. La kompakta disko kun simpla nomo *Esperanto* estis eldonita en 400 000 ekzempleroj. La disko estas dulingva (pole kaj Esperante) kaj celas prezenti Esperanton al ĝenerala publiko per luda, amuza formo.

La DVD *Esperanto elektronike* estas la plej ampleksa kaj la plej bunta kompleta materialo pri la internacia lingvo Esperanto. Ĝi celas du publikojn: al esperantistoj ĝi donas amason da interesaj E-materialoj (libroj, artikoloj, muziko…), al neesperantistoj ĝi liveras informojn pri Esperanto, kursojn, vortarojn… Aperis kvar eldonoj de la furora disko, ĝi alportas enhavon en 26 lingvoj, la lasta eldono estis la plej ampleksa, kun multaj novaj fotoj, libroj, kantoj, gazetoj, ktp. La kompleta enhavo de tiu ĉi disko aperas nun ankaŭ senpage rete ĉe: http://dvd.ikso.net.

La DVD-video *Esperanto estas…* estas moderna inform-filmo pri Esperanto, dediĉita al neesperantista publiko. Ĉefa celo estas prezenti Esperanton kiel vivan, modernan kaj plene funkciantan internacian lingvon kun multaj trajtoj. La filmo havas 43 minutojn kaj 6 partojn, ĉiu prezentanta alian aspekton de Esperanto. Entute la filmo havas voĉ-registron en 10 lingvoj

kaj subtekstojn en 26! La DVD-video aperis en 2 eldonoj – dividitaj laŭlingve (versio A kaj B), ambaŭ po 2000 pecoj. La filmo spekteblas ankaŭ en YouTube.




La DVD-j *Vikipedio en Esperanto – eksterreta eldono* 2012 kaj 2014 estas interesaj kaj de la enhava kaj de la arkiva vidpunkto. Sur la diskoj ja aperas la kompleta tiama enhavo de la E-lingva Vikipedio. Se do hazarde la reto ĉesos funkcii, la Esperanta versio de Vikipedio estos savita.
Jen la listo de la libroj, kompaktdiskoj kaj DVD-j eldonitaj de E@I:

1. KD *lernu!* (2003)
2. libro *Manlibro pri instruado de Esperanto* (2005, kunlabore kun ILEI)
3. DVD *Esperanto Elektronike* (2006, 2011)
4. libro *Vikipedio – praktika manlibro* (2007, aŭtoro Yves Nevelsteen)
5. libro *Komputeko* (2008, aŭtoro Yves Nevelsteen)
6. KD *Esperanto* (2008, 400 000 ekzempleroj aperis en *Gazeta Wyborcza* antaŭ la 94-a UK)
7. libro *Vikipedio por vi* (2008, aŭtoro Ziko van Dijk)
8. DVD-video *Esperanto estas…* (2008, reĝisoro Rogener Pavinski)
9. broŝuro *Malkovru Esperanton* (2009, iniciatita de Hokan Lundberg)
10. libro *Detala gramatiko de Esperanto* (2010, aŭtoro Bertilo Wennergren)
11. libro *Modernaj teknologioj por Esperanto* (2011, prelegkolekto de la konferenco KAEST 2010)
12. DVD *Vikipedio en Esperanto – eksterreta eldono 2012*
13. libro *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj* (2013, prelegkolekto de la konferenco KAEST 2012)
14. DVD *Vikipedio en Esperanto – eksterreta eldono 2014*
15. libro *Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon* (2015, prelegkolekto de la konferenco KAEST 2014)
16. libro *toki pona en 76 ilustritaj lecionoj* (2013, 2014, Entute la unua papera lernolibro de la lingveto toki pona, lernebla pere de Esperanto, 2 eldonoj)
17. libro *Lingvomanio* (2015, Proverboj kaj idiomoj de 28 lingvoj de Eŭropo)

Pli da informoj pri unuopaj verkoj vi trovos en nia retejo www.ikso.net.

Krom tiu ĉi agado aperas ankaŭ aliaj eldonaĵoj, rilataj al EO, foje tre popularaj. Bona ekzemplo estas la broŝuroj: Malkovru Esperanton, kiu ĝis nun aperis en 10 lingvoversioj. Tre ŝatataj estas ankaŭ diversaj Esperantaj T-ĉemizoj, kaj aliaĵoj, kiel ekz. insignoj aŭ glumarkoj.

### Retaj projektoj

E@I kreis, kunkreis kaj funkciigas plurajn retpaĝarojn, kiuj rilatas al edukado en interreto kaj havas rilaton al Esperanto aŭ lingvoj ĝenerale. Pluraj el la retpaĝaroj estas konstante prizorgataj, kelkaj funkcias sen aktiva prizorgo, kaj kelkaj estis transdonitaj al aliaj organizoj. E@I ankaŭ kiel partnero subtenas personajn iniciatojn de siaj membroj, ekzemple per disponigo de rethotela loko.

Jen la listo de unuopaj projektoj:
Esperanto:

- www.lernu.net
- www.vortaro.net
- www.komputeko.net
- www.bretaro.net/
- http://dvd.ikso.net
- http://drakoj.ikso.net/
- http://ridejo.ikso.net/
- http://apetito.ikso.net/
- http://eo55.ikso.net/
- http://blogo.ikso.net/
- http://kantaro.ikso.net/




Aliaj lingvoj:

- http://slovake.eu/ (13 lingvoj, inkluzive de EO)
- http://deutsch.info/ (15 lingvoj, inkluzive de EO)
- http://tokipona.info/ (kurso kun ekzercoj, de EO)
- http://speaklearn.eu/ (20 lingvoj, inkluzive de EO)
- http://lingvo.info/ (21 lingvoj, inkluzive de EO)
- http://mluvtecesky.net/ (5 lingvoj)
- http://espa2.eu/ (11 lingvoj)

Aliaj edukaj:

- http://monda.eu/ (10 lingvoj, inkluzive de EO)
- http://cyberhelp.eu/ (8 lingvoj)

Neaktualaj/Neaktivaj/Dormantaj:

- aktuale.info (atendas renovigon)
- interkulturo.info
- nitobe.info

**Staĝoj**



De 2010 ĝis 2013 laboris en E@I entute 14 staĝantoj el 6 landoj (8 per Erasmus, 1 per Campus Hungary, 5 sen stipendio).

Nome de EVS (Eŭropa Volontula Servo) E@I akceptas en sia oficejo en Partizánske volontulojn (18-30 jaraj) por labori pri diversaj projektoj.
Ĝis nun: 9 volontuloj el 9 landoj.

- Matthieu Desplantes (Francio)

- Kaan Kızılgün (Turkio)
- Rasmus Åkerlund (Svedio)
- Matthias von Laer (Germanio)
- Anna Liszewska (Pollando)
- Alberto Muzzu (Italio)
- Elena Ĥusanova (Rusio)
- Oleh Rohalskyj (Ukrainio)
- Robert Nielsen (Irlando)

**Aliaĵoj**




Ekde la 1-a de julio 2011, danke al subteno de la urbo Partizánske kaj ties urbestro Jozef Božik, E@I disponas pri propra oficejo en ĝia urbocentro. La unua oficejo havis la surfacon de 60 m² kaj laborlokojn por 5 personoj. En junio de 2013 estis ŝanĝita loko de oficejo ene de la sama konstruaĵo, la oficejo iĝis pli granda kun 100 m² kaj du ĉambroj. Ekde ĝia stariĝo ĉiuj staĝantoj kaj surlokaj aktivuloj de E@I komune laboras tie.

Kun Vikipedio jam estas longjara kaj diversspeca kunlaboro, ekde instigo al Esperantistoj verkadi, eldonado de libroj pri ĝi, okazigo de konkurso, kunorganizado de trejnadoj ktp.

Foje E@I lanĉas monkolektajn kampanjojn, ĉefe kun konkreta celo, por subteni konrektan projekton. Tiel okazis por ekz. eldoni la DVD-jn (Esperanto Elektronike, Esperanto estas…), por aperigi retan version de PIV (vortaro.net) aŭ helpi kolekti financojn por ESF.

Multfoje jam aperis diversspecaj artikoloj en Esperanto-gazetaro de E@I-teamanoj. Regule ili aperas en La Ondo de Esperanto, ofte en la revuo Esperanto, en Libera Folio, Esperantisto Slovaka, ktp. Ankaŭ pli kaj pli ofte aperas mencioj pri diversaj projektoj de E@I en neE-a gazetaro diverslande, ĉefe lige kun la edukaj lingvo-retejoj.

E@I kunorganizas aŭ alimaniere kontribuas al la kleriga programo de aliaj esperanto-aranĝoj, ekzemple al la seminario Sabla Printempo okazanta en Ĉeĥio aŭ la Esperanta Vikimanio (okazinta en 2011 en Svitavy). Ankaŭ en la programo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto laste aperas kontribuoj de E@I (propraj prelegoj dum la 93-a UK; propra salono dum la 94-a UK; du kontribuoj al la Kleriga lundo kaj organizo de la Terminologia forumo dum la 96-a UK, prezentoj dum la Kleriga lundo dum la 98-a kaj 100-a UK)…

E@I tre regule kunlaboras kun diversaj organizoj, kaj Esperantaj, kaj ne-Esperantaj, por atingi siajn celojn. Tia kunlaboro foje estas longjara kaj tre vasta, kiel ekz. kun la firmao Studio Gaus GmbH, kiu nun ĉefprogramas ĉiujn grandajn edukajn projektojn, kaj la posedanto de ĝi, Jevgenij Gaus, ja estis antaŭa aktivulo en E@I kaj TEJO. La kunlaboro povas havi tute diversan aspekton, kaj daŭron. E@I jam kunlaboris kun multegaj organizoj pri multaj projektoj, ekz. Kun EEU, ILEI, TEVA, SAT, TEJO, UEA, Landaj asocioj, diversaj ne-Esperantaj organizoj, universitatoj ktp.

Financa subteno estas daŭre unu el la plej grandaj defioj por E@I – ju pli da profesiaj projektoj kaj teamanoj, des pli da financoj estas bezonataj. Malfacilas foje trovi sumojn por ĉiu inda projekto, tial ofte kelkaj planoj devas atendi dum jaroj, por povi realiĝi. Kelkaj atendas ĝis nun… Se iu emus subteni la agadon de E@I, detaloj pri la subtenebloj: http://www.ikso.net/eo/subtenu/index.php
Jen du niaj plej grandaj sponsoroj:

- ESF - La plej granda subtenanto de nia agado poresperanta estas sendube “Esperantic Studies Foundation”, sed kiu multaj el nia projektoj tute ne ekzistus. Grandan dankon al ili, E@I esperas ankaŭ en la estonte proksime kunlabori!
  http://esperantic.org/
- EU - Ĉiuj grandaj edukaj retejoj (krom lernu.net) aperis danke al la subteno de Eŭropa Komisiono kaj EU entute. Ekde la jaro 2009 E@I jam regule partoprenas projektojn, subtenitajn de EU, kaj danke al tio entute povas labori kaj antaŭenigadi siajn celojn.

Kompreneble, granda danko apartenas ankaŭ al ĉiuj privataj donacintoj kaj ĉiuj volontuloj, kiuj dum la tuta vivodaŭro de E@I helpas al la organizo diversmaniere! Sen tiu heroa laboro de multaj homoj de la tuta mondo E@I jam certe ne ekzistus.

Jen, la 10-jariĝo de E@I estas bona okazo sumigi aktivecojn kaj aktivadojn de ĝi. Tiu ĉi artikolo volis doni almenaŭ bazan superrigardon pri diversaj kaj buntaj agadoj, pri kiuj E@I okupiĝas. Certe eblus skribi multe pli, eĉ pri ĉiu unuopa projekto. Sed la novaj projektoj jam atendas sian realigon, do estas tempo adiaŭi kaj daŭrigi la laboron. Ĝis revido ĉe iu el la projektoj aŭ aranĝoj de E@I!
Pli da detaloj pri E@I: www.ikso.net, https://eo.wikipedia.org/wiki/E@I

Matthieu Desplantes

# ITALA ESPERANTO-KONGRESO 2016

Johan Wolfgang von Goethe estis vera geniulo. Li aliĝis al la Itala Kongreso de Esperanto antaŭ pli ol 200 jaroj, kiam ekzistis nek Italujo, nek Esperanto. Li venis al Frascati (Fraskati) en la fino de la 18-a jarcento, kaj multe ŝatis la urbeton, kiu memoras pri li kaj afiŝas sur marmoraj tabuloj liajn laŭdojn.
Vi havos eĉ pli varma akcepton, se vi sekvos lin. Rigardu en http://kongreso.esperanto.it/83/ kaj aliĝu tuj.
Temo de la kongreso estos: Instruado de lingvoj en eŭropaj lernejoj. Abundos prelegoj, muzikaj prezentoj kaj ekskursoj al centritalaj turismaĵoj. Kompreneble Romo el nia vidpunkto povas esti konsiderata periferio de Frascati, kaj tie nin akceptos la papo en ĝenerala aŭdienco. Ni kaj 250 aliaj kongresanoj el la tuta mondo atendas vin.

La LKK

# EU-FINANCATA PRIESPERANTA PROJEKTO EN BRITIO




Eble vi memoras ke antaŭ du jaroj ni sendis projektproponon al la brita nacia agentejo por peti monon kadre de la tiama Grundtvig-programo por kelkaj Esperanto-organizoj. Tiam, la projektpropono estis malaprobita. En la pritakso estis amaso da pozitivaj komentoj, kaj praktike la nura negativa komento estis: "la intenco uzi Esperanton kiel laborlingvon de la partnerado estas nekutima kaj pli detala priskribo pri kiel tio funkcius en la praktiko estintus utila". Ja en ĉiuj projektproponoj en kiuj ni laboris, ni neniam kaŝis la uzon de Esperanto, kiam tiu estas efektive uzata.

Vi eble memoras ke tiam mi konsultis kelkajn esperantistojn, kaj sendis formalan apelacion. La celo ne estis aprobigi la projektproponon, ĉar ŝanĝoj en la decidoj estas praktike neeblaj, sed estis montri sobre kaj akurate la efektivan funkciadon kaj taŭgecon de Esperanto kiel laborlingvo - ĉefe por la estonteco.

Ni havis tra la jaroj pliajn kontaktojn kun la brita nacia agentejo - ili ankaŭ venis viziti nin en Edinburgo (laŭ mi ankau surbaze de nia letero, scivolemaj pri brita entrepreno kiu uzis Esperanton), kaj ni tenis personajn kontaktojn kun ili. Kaj laste ni laboris kun ili pro du Grundtvig-partneraj projektoj en kiuj rolis Esperanto-Asocio de Skotlando.

La fina pritakso de tiuj lastaj projektoj ĵus alvenis. Evidente ni aparte rimarkigis la rolon de Esperanto en la finaj raportoj. Kaj jen rimarku kio estas skribite en ilia pritakso:
We found the project overall to be very interesting and rewarding. In particular it was good to see the use of Esperanto to create equality in communication across the partnership.

(Ni pritaksas la tutan projekton tre interesa kaj kontentiga. Ĉefe estis bone vidi la uzon de Esperanto por krei egalecon en la komunikado inter la partnereco.)
Tio estas neimagebla frazo el angloparolanto.


Francesco Maurelli

# TASKARO POR KREI MATERIALON KIU EBLIGOS PRAKTIKAN RAPIDAN ANTAŬKURSON POR RAPIDIGI LERNON DE FREMDLINGVOJ

Pri la propedeŭtika valoro de Esperanto oni jam parolas dum pli ol 30 jaroj, kiam tiun vorton »propedeŭtiko« (antaŭlernado de iu scio kiu ne mem estas celo de la lernado sed grave plirapidigas poste la akiron de celata scio) enkondukis prof. Helmar Frank.
Sed veran, konvinkigan eksperimenton kiu science kaj praktike pruvus tiun aserton ke unujara antaŭa lernado de Esperanto ebligas dum du pliaj jaroj lerni iun eŭropan nacian fremdlingvon kun pli da efikeco ol lerni dum tri jaroj la saman lingvon sen antaŭa propedeŭtikilo, neniu ankoraŭ efektivigis. Tial mi pripensis kion ni devus fari konkrete por realigi tion, tamen por ni reale efektivigebla. Jen kion mi proponas:
Necesas krei kursaron por etaj infanoj (5-8-jaraj) por lude lerni uzi lingvon tre simplan kaj regulan, kiu enhavas ĉiujn esencajn trajtojn de homaj lingvoj, ne estas kompleta lingvo, kaj estas minimuma kiu sufiĉas por internigi bazajn ideojn pri lingva konsisto kaj regulado.
Krei ĝin baze de frekvencmorfemaro kreita baze de esploroj de Z. Tišljar kaj R. Gerard (aŭgusta numero de Eŭropa Bulteno), kiu kovras 95% de la ĉiutage uzata Esperanto kaj konsistas el 450 morfemoj.
I. Starigi laborgrupon por ellabori konkretajn lecionojn kaj ekzercaron por la kurso (ekz.: Angela Tellier, Zlatko Tišljar, Jevgenij Gaus…)

II. Krei baze de tiu materialo aron da aplikoj por elektronikaj medioj (ludoj, ludtestoj, konkuroj…). Eventualaj realigantoj: Chuck Smith, Petro Balaž….)

III. Post tio krei konkretan lernolibron kun ekzercaro, paperan por la lernado per la angla lingvo kaj konkretajn aplikojn por la elektronikaj medioj ankaŭ anglalingvajn



IV. Fine tradukigi la tutan materialon al laŭeble multaj lingvoj.

La taskaro estas grandega sed strategie esenca por ke ni povu transiri de teoria parolado pri propedeŭtika valoro de Esperanto al praktikaj proponoj eklabori kaj montri ke tio funkcias. Por la tuto necesas iu baza financo, ĉar sen fakuloj kiel Gaus kaj Smith ne eblas rapide realigi la aferon kaj por tio necesas ilin pagi (almenaŭ per minimumo, kiun ili akceptus).
Tial:

a) La organoj de EEU, UEA kaj ILEI diskutu la aferon kaj akceptu la planon kiel sia tasko
b) Ĉiuj serĉu manieron financi la projekton (per propraj rimedoj, per peto al fondaĵoj kiel ESF, per kampanjoj kolekti helpon inter la esperantistaro),

ĉar bedaŭrinde por tiu celo ne estas realisme ricevi financadon de iu EU-fondaĵo.

Zlatko Tišljar

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**
Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.
Finredaktita: la 31-an de decembro 2015
Redaktoro: Zlatko Tišljar
En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Jozef Reinvart, Matthieu Desplantes, Małgosia Komarnicka, Francesco Maurelli, LKK de Itala E-kongreso
Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com
Retpaĝo: http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno

Eŭropa Esperanto - Unio
Por efika kaj maldiskriminacia komunikado
www.europo.eu